# JURA TRIBUNO INTERNACIA §

N-ro 22
Jaro 2023
Internacia Jurista Esperanto-Asocio

**JURA**
**TRIBUNO**
**INTERNACIA**

Eldonita de Internacia Jurista Esperanto-Asocio
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta adreso: Jura Tribuno Internacia
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

ret-adreso: jurista@esperanto.ac

Direktoro: José M. Rodríguez
Kunlaborantoj: D-ino Mª Rafaela Urueña Álvarez (Hispanio)
Advokato Miguel Faria de Bastos (Portugalio)
Alejandro Burgos Escalante (Hispanio)
Raul Cândido Souza (Brazilo)

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Nova milito skuas la mondon | 3 |
| Vivo de la Asocio | 4 |
| Dungitaj soldatoj kaj sekurec-kompanioj en la Internacia Juro | 8 |
| Klimataj rifuĝintoj | 15 |
| Juraj informoj | 25 |
| Koŭto Miksta. Antikva "ŝtato" inter Portugalio kaj Hispanio | 28 |
| Novelo: *La kazo de la avara panisto* | 31 |
| Jura Vortaro | 36 |
| Galerio de Elstaraj Juristoj *"José Garzón Ruiz"* | 38 |
| Kino kaj Juro *“Muzik-skatolo”* | 39 |
| Aliĝo al IJEA | 42 |

La revuon ricevas ĉiuj membroj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Por aliĝoj legu informojn sur la paĝo 42-a.



# Nova milito skuas la mondon

Nova milito skuas la mondon, tio jam ne surprizas nin, ĉar de la komenco de historio, homoj luktas kaj murdas. Eble oni povas trovi malsimilajn kialojn: religio, teritorio, politiko... tamen, ili estas nur ekskuzoj, la vera kaŭzo de ĉiuj militoj estas la atingo de povo. Povo estas multe pli grava ol niaj apuduloj.

Tamen, kiam oni demandas pri ĉi tiu temo, la respondo estas universala, ni ĉiuj deziras vivi en paco kaj ni ĉiuj amas la pacon. Doa, se preskaŭ ĉiuj homoj deziras tion, kial estas tiel mafacile vivi en paco?

Unue, estas necese diri, ke paco ne signifas malforton. Paco estas la absoluta bezono vivi kaj neniu forto estas pli granda ol nia deziro vivi. Paco estas kompreni ankaŭ, ke ankaŭ niaj apuduloj deziras vivi. Nur kiam povo estas en la manoj de tiuj kiuj tute ne valorigas niajn apudulojn kaj eĉ subtaksas ilin, paco riskas.

Paco ankaŭ ne signifas naivecon aŭ ludadon de pasiva rolo, ankaŭ ne temas pri trankvila kontemplado de la vivo. Paco estas instruado, kunvivado, respekto al tiuj kiuj troviĝas apud ni. Ni interkompreniĝu, pere de internacia lingvo aŭ simple pere de silentaj voĉoj, sed ni unue devas serĉi komprenon, nur tiel ni ekkonsciu pri la avantaĝoj de mondo sen perfortaj konfliktoj.

Ni ĉiuj konsentas, ke ni deziras trovi pacon, sed cele al tio multaj aferoj devas ŝanĝiĝi kaj ni devas tuj labori. Ni atingis lernojn el la akraj militoj de la pasinta jarcento kaj ni komprenu, ke nova tutmonda milito ne povas okazi, malgraŭ tio oni jam komencas paroli en nia mondo pri du blokoj. Ni estu pretaj ne sekvi tiun teruran vojon, ĉar nia celo estas lasi mondon en paco por la estonteco.

*Jura Tribuno Internacia*



# Vivo de la Asocio

## ORDINARA ASEMBLEA KUNSIDO DE INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO

La 1-an de aŭgusto 2023, okaze de la 108-a Universala Kongreso en Torino (Italio), en la kongresejo, je la 12:00 horo, ekokazis en la salono Grattapaglia, la asemblea kunsido de la Internacia Jurista Esperanto Asocio -IJEA-, sub la gvidado de Miguel Faria de Bastos, ties estrarano, eksa estrara prezidanto, akceptita por tiu gvidado, pro la foresto, pravigita, de la nuna prezidanto, S-ro José María Rodríguez Hernández.

Laŭ la teksto de la koncerna alvokilo, restis aprobita en la komenco la jena tagordo:

**1) Partopreno de la asocio en la Movada Foiro kaj Faka Forumo.**

S-ro Faria de Bastos informis, ke li mem partoprenis la Movadan Foiron kaj la Fakan Forumon. Li sciigis, ke la tablo dum la Movada Forio estis kundividita inter IJEA kaj UIAE -Unio Internacia de Advokatoj Esperantlingvaj-. Li, tiutable, respondis al demandantoj pri IJEA kaj li disdonis broŝurojn kaj flugfoliojn de la asocio.

**2) Submetado de la estrara raporto kaj de la kontoj de la Asocio ekde ties komenca agado ĝis 15.07.2023, al la konsidero kaj voĉdonado de ties membraro.**

Laŭ la estrara raporto, dum la periodo julio 2022 / julio 2023 IJEA iomete stagnis, kvankam ĉi tio ja estas ofta situacio en nia asocio. La kunveno de la jura asocio en Montrealo disvolviĝis sufiĉe kontentige. Dum ĝi oni elektis novan estraron. Same, okazis prelego pri la jura situacio de la kanadaj indiĝenoj.

Rilate la membrojn de la asocio, nuntempe ni povas paroli pri 70 membroj kaj simpatiantoj, kvankam malmultaj el ili pagas kotizon. Verdire, ni devas solvi tiun aferon, sed ne temas pri urĝa afero, ĉar la asocio ne havas

financajn problemojn. Rilate la eldonan agadon, ĝis la monato marto 2023 aperis akurate nia informilo *Jura Semajno*, tamen pro informadikaj problemoj de la redaktoro -la komputilo pleniĝis per spamaĵoj-, la apero de la semajna bulteno de marto ĝis julio estis ne-ofta. Espereble, la eldonado kaj dissendado de la bulteno normaliĝos meze de septembro.

Pri la revuo *Jura Tribuno Internacia*, la unua numero de la kuranta jaro estas preskaŭ preta, kvankam ne estis eble eldoni ĝin samtempe al la Universala Kongreso. Espereble, ĝi aperos komence de septembro kaj dua numero en decembro.

Pri la financa situacio de la asocio jen la konto-stato:

| **Enspezoj** | | **Elspezoj** | |
|---|---|---|---|
| Kotizoj | 31 € | Luado de salono | 140 € |
| Donaco | 600 € | Kotizo kiel faka asocio de UEA | 44 € |
| Entute | + 631 € | | - 184 € |

Rezulto: + 447 €

Mono je la 31-a de decembro 2022: 126,82 €
**Nuntempe la asocio disponas pri** 126,82 + 447 = **573,82 €**

S-ro Faria de Bastos legis jenan raporton, kiu ankaŭ estis havigita al ĉeestantoj, kune kun la kontoj. Oni submetis ambaŭ aferojn al voĉdonado, kiu estis unuanime favora. La asembleestro profitis por atentigi, ke la anonima donaco deklarita en la kontoj verŝajne estis elpoŝigita de la estrara prezidanto mem, proprakoste, por kovri lastjaran deficiton de la Asocio. Ĉi-afere, li petis, ke ĉiuj anoj pagu ĝustatempe sian jaran kotizon por eviti financan krizon ene de la Asocio.

**3) Revuo de IJEA.**

S-ro Faria de Bastos disdonis ekzemplerojn de la revuo *Jura Tribuno Internacia*, lasta numero kaj kelkaj antaŭaj ekzempleroj. Li atentigis, ke apenaŭ aliaj krom la prezidanto mem verkas artikolojn por la revuo *Jura Tribuno Internacia* kaj por la bulteno *Jura Semajno*. Li petis, ke anoj kontribuu aktive por verkado de artikoloj kaj por la revuo.

**4) Prelego de la estrara prezidanto.**

S-ro Faria de Bastos legis la prelegon de la estrara prezidanto sub la titolo "Dungitaj Soldatoj kaj Sekurec-kompanioj en la Internacia Juro" kaj li notis la nomojn de ĉeestantoj petantaj sendon de ekzemplero pere de ret-poŝto.

**5) Rutinaj aferoj.**

Neniu ero estis proponita.

Ĉar ne estis pluaj komentoj nek intervenoj, finiĝis la asemblea kunsido de Internacia Jurista Esperanto-Asocio de la jaro 2023, kies protokolo estos subskribita de la prezidanto de la estraro kiel porokaza asembleestro.

*Miguel Faria de Bastos*

## PROPONO PRI SENPAGA KURSO PRI INTELIGENTECO EL MALFERMITAJ FONTOJ KAJ KIBERNETIKA SEKURECO POR MEMBROJ DE IEAJ

Membro de nia asocio, S-ro Raul Cândido, de Brazilo, proponas al membroj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio senpagan kurson pri OSINT (Inteligenteco el Malfermitaj Fontoj) kaj Kibernetika Sekureco. OSINT havas rilaton kun la praktika laboro de advokatoj. Temas pri traserĉilo, kiu povas altigi la juristan praktikon per pli ampleksa kaj preciza informo.

Advokatoj povas atingi profiton el OSINT en pluraj manieron. OSINT permesas al ili atingi kompletan bildon de kazo aŭ de kliento, tio ja estas grava por informitaj konsiloj. Oni povas kolekti publikaĵojn, sociajn kaj mediajn kontribuojn kaj ankaŭ aliajn informojn por subteni ties aferojn. Ankaŭ OSINT povas helpi ilin trovi spurojn, informojn kaj atestantojn en procesaj aferoj.

La kurso inkludas detalan esploron de OSINT-teknikoj, inteligentecaj strategioj por informa kolekto, kaj efika uzo de malfermitaj fontoj en la jurista kunteksto. Ĉi tio estos okazo por niaj membroj disvolvi siajn kompetencojn kaj plibonigi siajn kapablojn en tiuj ĉi kritikaj areoj, kontribuante al pli sukcesa kaj kvalita praktiko de la advokata profesio.

Interesitoj kontaktu kun: raulcandido.souza ĉe gmail.com

ĉe = @



It is justice, not charity, that is wanting in the world!

Mary Wollstonecraft  (1759/ 1797)

Brita verkistino, filozofino kaj frutempa feministino

*Justico, ne karitato, jen kio mondo bezonas!*



# Dungitaj soldatoj kaj sekurec-kompanioj en la Internacia Juro

*José María Rodríguez Hernández (Hispanio)*

La libera merkato en nia nuntempa mondo estas tiel aktuala, ke ĝi atingis unu el la agadoj kiu ĝis nun apartenis monopole al ŝtatoj, tio estas: la uzo de armita forto. Certe, post la alpreno de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj en la internaciaj rilatoj, la uzo de forto estas tute malpermesita, escepte kiel reago al agreso. Tamen, ni devas akcepti, ke post la jaro 1945-a dum neniu tago nia mondo forgesis militojn kaj lastatempe estas eble vidi, ke la partoprenantoj en tiuj militoj ne estas ekskluzive soldatoj de la militantaj ŝtatoj.

Tiel, ni vidas dum la lastaj jaroj, ke privataj kombatantoj partoprenas en internaciaj konfliktoj, ekzemple en Irako apoge al usonaj soldatoj kaj nun en Ukrainio, tie dungitaj membroj de la sekurec-kompanio Wagner helpas la rusan armeon. Tamen, la ĉefa karakterizaĵo de tiu privataj kombatantoj estas la fakto, ke ili estas membroj, aŭ pli bone diri, ke ili estas dungitoj de privataj entreprenoj, kies ĉefa celo estas asisti eksterlandajn registarojn el la milita aŭ el la sekureca vidpunkto.




Reklam-afiŝo en Rusio por aliĝi al Grupo Wagner

Tiuj laboroj pri asistado ne nepre signifas, ke tiuj privataj kompanioj partoprenas rekte en kombatoj, ĉar multaj el ili, aŭ eĉ la plejmulto, ĉefe konsilas la registarojn pri aferoj rilataj al milito aŭ al sindefendo. Ekzemple, estas tre ofte vidi tiujn kompaniojn okaze de hibridaj atakoj, tio estas: agresoj aŭ defendaj agadoj kiuj okazas ne sur milit-kampo sed ĉe la virtuala mondo. Ĉi tiuj virtualaj atakoj povas

konsisti, ekzemple, en influado sur la registaro aŭ sur la publika opinio de atakata aŭ atakota lando. Do, ĉi tiu virtuala agreso povas esti plenumita rekte de privata sekurec-kompanio dungita de atakanta ŝtato.

Do, ni studu kiamaniere estas regulita kaj pritraktita la agado de ĉi tiuj privataj kompanioj en la Internacia Juro.

Unue, estas necese diri, ke ĉi tiuj grupoj, ĉi tiuj kompanioj, estas tradicie nomitaj de la internacia juro kiel "dungo-soldataro". Kvankam nuntempe, ili ricevas aliajn nomojn, kiel privatajn sekurec-kompaniojn, privatan armeon aŭ eĉ privatajn soldatojn. Tamen, el la historia perspektivo ni ne troviĝas antaŭ nova agado, tiel, ĝis la fino de la 19-a jarcento, estis tre ofte vidi dungitajn soldatojn en kombatoj apoge al unu el la armeoj.

Ekzistas eĉ famaj historiaj ekzemploj pri tiuj soldatoj, tiel la Svisa Vatikana Gvardio, kiu reale estis en la origino svisaj dungo-soldatoj. Interkrampe ni diru, ke svisoj, kvankam nuntempe estas neŭtralaj okaze de armitaj konfliktoj, historie ili estis tre bravaj kombatantoj, do, ili estis tre estimataj soldatoj en ĉiuj armeoj kiuj povus dungi ilin.



Svisa gvardio en Vatikanurbo

Post la naskiĝo de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj, la agado de tiuj dungitaj soldatoj estas tute malpermesita en internacia juro. Tiel, en la jaro 1989 estas aprobita internacia konvencio kontraŭ rekrutado, financado kaj trejnado de dungitaj soldatoj. Sed la unua deviga afero, se ni pristudas ĉi tiun temon estas respondi, ĉu la membroj de la nuntempaj sekurec-kompanioj estas dungitaj soldatoj aŭ ne. Ni ne forgesu, ke ĉi tiuj kompanioj asistas kaj helpas al ŝtatoj ĉe sekureca agad-kampo, do, ne nepre ili partoprenas rekte en kombatoj kontraŭ

malamikoj de tiuj registaroj. Verdire, dungitaj laboristoj de tiuj kompanioj ne estas esence kaj nepre dungitaj soldatoj, pro la fakto, ke ties funkcio estas asisti, trejni, provizi kaj helpi registarojn en aferoj rilataj al defendo.

Vere, dungita soldato, almenaŭ el tradicia vidpunkto, estas homo pagita de eksterlanda registaro kun la celo kombati; male, ĉi tiuj privataj kompanioj ne plenumas, aŭ ne ekskluzive plenumas tiun funkcion. Verŝajne, por solvi ĉi tiun difinan problemon, tio estas difini kio estas dungita soldato kaj kio estas ano de privata sekurec-kompanio, la Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj avertas ofte al ĉiuj ŝtatoj, ke estas necese kontroli kaj priatenti la agadojn de tiuj kompanioj por eviti rekrutadon, trejnadon kaj financadon de homoj, tio estas de privataj soldatoj ene de internaciaj konfliktoj. Do, vole ne-vole, Unuiĝintaj Nacioj avertas, ke la ĉeesto de tiuj privataj sekurec-kompanioj en internaciaj konfliktoj povus finiĝi rekte en la partopreno de dungitaj soldatoj en milito.

Ni vidu nun kiamaniere la internacia juro regulas la agadon de la dungitaj soldatoj kaj ankaŭ kiel la agado de tiuj privataj kompanioj povus esti regulita de la internacia juro, se ni konsideras, ke ambaŭ figuroj ne estas esence samaj, kvankam ili povus ja esti tre similaj.

Internaciaj konvencioj de Ĝenevo kaj Den Haag konsideras malsimilajn partoprenantojn kaj ĉeestantojn kadre de internacia milita konflikto, jen ili:

• **Kombatanto:** estas la homo kiu aktive kaj rekte partoprenas en la milito. Li ne povas esti punita pro tio, escepte se li faris milit-krimon. Krome, se li estas kaptita de la kontraŭa armeo, li ĝuas la statuson de milit-kaptito.

Kombatanto povas esti *"regula kombatanto"*, tio estas: soldato de armeo. *"Ne-regula kombatanto"*, tio estas: gerilisto kiu luktas sen rektaj ordonoj de armeo, kvankam ili helpas ĝin pere de sporadaj atakoj kontraŭ malamikaj soldatoj; *"cirkonstanca kombatanto"*, temas pri civilulo kiu atakas malamikajn soldatojn en konkreta momento, tamen li estas nek regula soldato, nek gerilisto. Cirkonstanca kombatanto plenumas kombatan funkcion dum momento kaj kun specifa celo, ĉefe ribelado ofte ne-armita kontraŭ la okupanto.

Ene de la kategorio de kombatantoj estas eble trovi la figuron de la *kontraŭ-leĝa kombatanto*, tiel: spionoj, kaŝ-pafistoj kaj soldatoj uzantaj uniformojn de la kontraŭa armeo.

Laŭ internacia juro, ĉiuj kombatantoj, escepte tiuj kontraŭ-leĝaj, devas esti traktataj kiel normalaj kombatantoj, same se ili estas kaptitaj. Do, kontraŭ-leĝaj kombatantoj, tio estas: spionoj, kaŝ-pafistoj kaj soldatoj en aliaj uniformoj

ne ĝuas tiun statuson. Pri la ne-apliko de tiuj privilegioj al kontraŭ-leĝaj kombatantoj ni memoru, ke fine de la Dua Mond-milito, pli ĝuste okaze de la atako de la germanaj trupoj en la montaro Ardenoj inter Belgio kaj Luksemburgio, multaj germanaj soldatoj atakis usonajn poziciojn vestitaj en usonaj uniformojn, kun la celo konfuzigi la usonajn soldatojn. Tiuj germanaj soldatoj en usonaj uniformoj, se malkovritaj kaj kaptitaj estis tuj mortpafitaj, ĉar ili ne ĝuis la statuson de milit-kaptitoj.



Germanaj soldatoj mortpafotaj, sub la akuzo porti usonajn uniformojn
dum la batalo ĉe Ardenoj 1944 - 1945.

• **Ne-kombatanto:** temas pri tiuj civiluloj, kiuj ne povas esti atakitaj se ili ne partoprenas aktive en la kombato. Se ili estas kaptitaj, ili ĝuas saman statuson kiel milit-kaptitoj.

Ĉi tiuj ne-kombatantaj civiluloj, tamen, povas sekvi aŭ akompani militajn fortojn, kvankam ne partoprenante rekte en tiuj fortoj. Ekzemple, ni parolas pri ebla civila anaro de militaj ŝipoj aŭ aviadiloj, ankaŭ civilaj laboristoj de milit-bazo. Ankaŭ estas "ne-kombatanta civilulo" la ĵurnalisto kiu akompanas la armeojn kun la celo informi pri la milito.

Se paroli pri konkreta ekzemplo de "ne-kombatanta civilulo" akompananta militan forton, ni povas memori la kazon de tiuj argentinaj civilaj radioamatoroj kiuj akompanis la argentinan armeon dum la milito en la Malvina insularo (Falklanda insularo por britoj), sude de la Atlantika Oceano en la jaro 1982. La celo de tiuj civilaj radioamatoroj, lokigitaj en la marbordoj de la insularo estis informi al la argentina armeo pri la movo de britaj ŝipoj proksime al la disputitaj insuloj.

Do, resume, ni povas trovi civilulojn ne-kombatantajn kiuj akompanas la armeon, kvankam ili ne partoprenas rekte en kombatoj. Tamen, okaze de kaptiteco, ili ĝuas la statuson de milit-kaptito.



Argentina soldato kaj civila radioamatoro en la Malvina/Falklanda Insularo. Suda Atlantiko 1982.

**Kaj kion rilate al dungitaj soldatoj?**

Nu, la Aldona Protokolo al la Konvencio de Ĝenevo de la 12-a de aŭgusto de 1949 inkluzivas ene de la grupo de kontraŭ-leĝaj kombatantoj al dungitaj soldatoj, kvankam por esti tiel konsiderataj, estas necese, ke ili partoprenu en kombatoj kaj la dungado devis okazi por atingi personan profiton. La enirigo de dungitaj soldatoj ene de ĉi tiu kategorio havigas neniun privilegion al ili okaze de kaptiteco. Do, dungita soldato ne rajtas ĝui la statuson de milit-kaptito.

Tamen, ree aperas ofta demando, ĉu dungitaj laboristoj de privata sekurec-kompanio nepre devas esti konsiderataj kiel dungitaj soldatoj? Se jes, ni memoru, ke ili estus tuj konsiderata kiel kontraŭ-leĝaj kombatantoj. Tamen, la respondo ne devas esti tiel rapida kaj tiel simpla.

Estas necese averti, ke la konsidero de tiuj dungitaj laboristoj de privataj kompanioj povas esti tute malsimila. Tiel, la agado de la anoj de tiuj privataj kompanioj povas esti tre diversa, certe ili povas partopreni rekte en konflikto kun armilo enmane, se tiel, la respondo estus tre facila, ĉar ili sendube estus konsideritaj kiel kontraŭ-leĝaj kombatantoj, tamen oni devas agnoski, ke la taskoj de tiuj dungitaj laboristoj povas esti diversaj: ili povas trejni soldatojn, sed ne partopreni rekte en kombatoj, ili ankaŭ povas provizi armeon je municioj kaj armiloj, ĉi-kaze ili estus ne-kombatantaj civiluloj akompanantaj armeon, okaze de kaptiteco de ĉi lastaj, ili ja ĝuos la statuson de milit-kaptitoj.

Do, vidite ke la membroj de tiuj privataj kompanioj ne povas esti rekte enkadrigitaj ene de absoluta kaj konkreta kategorio, tio dependos de la taskoj plenumitaj de ili. Tamen, verdire, se ili uzas armilojn ene de kombato ili sendube estus konsideritaj kiel kontraŭ-leĝaj kombatantoj.

Fina afero devas esti la pristudo de la konsekvencoj de akuzo de milit-krimo kontraŭ unu el tiuj privataj dungitoj de sekureca kompanio, ĉi tio jam okazis, kiam membroj de usona kompanio estas akuzitaj pro eblaj milit-krimoj dum sia agado ene de la malliberejo de Abu Grahib en Irako.

Vere, se ni parolas pri puna respondeco de homo okaze de plenumo de milita krimo, ni devas aserti, ke tiu respondeco sendube ekzistas, eĉ se la respondeculo ne estas soldato sed dungita soldato aŭ laboristo de privata kompanio. Do, el teoria vidpunkto, se dungita laboristo de sekurec-kompanio estas akuzita de milit-krimo, li povos esti juĝata de la Internacia Pun-Tribunalo. Tamen, por eviti tion, kelkaj ŝtatoj jam avertis, ke tiuj laboristoj troviĝas sub ties puna jurisdikcio se okazas akuzo pri milit-krimo. Tion jam sciigis la registaroj de Usono kaj en la sama senco de Britio. Ĉi lasta registaro informis, ke kiu ajn agado de membro de brita sekurec-kompanio dum milita konflikto estus konsiderata kiel agado de brita soldato. Kaj se paroli pri agado de privataj kompanioj en Irako, okaze de la invado fare de la usona armeo, laŭ oficiala deklaro, ili troviĝas sub la usona jurisdikcio, eĉ se ebla krimo okazis eksterlande, krome ni ne forgesu, ke Usono ne agnoskas jurisdikcion de Internacia Pun-Tribunalo ĉi-kaze.




Usonaj dungitaj soldatoj de la kompanio Blackwater en Irako.

Kaj kio rilate eblan respondecon de privata kompanio?

Ja estus grava antaŭa paŝo se la internacia komunumo konsideras eblan akcesoran respondecon, tiun de sekurec-kompanio okaze de krimo plenumita de unu el ties dungitoj. Rilate al ĉi tio, kvankam ne intime ligita al la kazo de milit-krimoj, oni devas memori, ke en la jaro 2003, Komitato pri Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj aprobis normon pri respondeco de privataj kompanioj okaze de atako aŭ ne-respekto de homaj rajtoj. Sendube, en la nuntempa internacia juro ne nur ŝtatoj estas la solaj roluloj kaj, iom post iom, transnaciaj kompanioj povas esti konsiderataj kiel subjektoj de la internacia juro.

Fine, estas necese diri, ke se hodiaŭ ni parolas pri la reguligo de la dungitaj soldatoj kaj la privataj sekurec-kompanioj en la internacia juro, tio ŝuldiĝas al la kruela milito en Ukrainio. Tie okazas aŭ okazis la agadoj de dungitaj soldatoj de la kompanio Wagner. Unue, estus necese pristudi la aferon, ĉu ili povus esti konsiderataj kiel dungitaj soldatoj aŭ nur kiel membroj de sekureca kompanio. Vere, laŭ informoj sciigitaj de amas-medioj, tiuj kombatantoj ne estas dungitaj rekte de la rusa registaro, sed de privata kompanio.

Do, denove ni devas paroli pri malsimila situacio de tiuj dungitoj. Tiel, se ili nur asistas rusajn kombatantojn, ili estus nur civiluloj kiuj partoprenas en milito. Tamen, verdire tio okazas nur el teoria vidpunkto, ĉar amas-medioj informas pri senpera partopreno de dungitoj de la grupo Wagner en la kombatoj. Do, laŭ tiuj informoj, ili povus esti konsiderataj kiel kontraŭ-leĝaj kombatantoj kaj okaze de kaptiteco, ili ne rajtus ĝui la statuson de milit-kaptitoj.





# Klimataj rifuĝintoj

*Rafaela Urueña Álvarez (Hispanio)*

Jarojn antaŭ mia emeritiĝo en la Universitato, mi klarigis al miaj lernantoj la klimat-ŝanĝiĝon. Kelkaj dubis pri tiu fenomeno, dum aliaj asertis kaj avertis pri eblaj malbonaj konsekvencoj estontece, nome: gravaj metereologiaj ŝanĝoj, troa varmeco, cunamoj, manko de akvo ktp.

Kaj jen, lastatempe kaj ĉi-somere, ni jam konstatis tiujn sekvojn, pro la terura varmeco kaj sekeco en la kamparo. Ni ĉiam pensas pri la teruraj konsekvencoj en la Naturo kaj la damaĝoj en la agrikulturo, turismo, fiŝkaptado ktp, tamen, ni ne pensas pri nova estulo kiu ankaŭ suferas ĉiujn ĉi damaĝojn, nome, la klimat-rifuĝinto, pri kiu, laŭ Agentejo de Unuiĝintaj Nacioj (AKNUR), antaŭvidas, ke la globala varmigo povas kondamni al ekzilo mil milionojn da homoj en venontaj jardekoj.



Rifuĝintoj eskapas el teruraj klimataj kondiĉoj en Afriko

La difino "media enmigranto" aŭ "klimata rifuĝinto" rilatas al homoj devigataj elmigri el ilia regiono pro rapidaj klimataj katastrofoj, kiel tertremoj, cunamoj, dezertiĝo, plialtigo de la marnivelo kiu ebligas malaperigi malgrandajn insulojn ktp. Memoru, ekzemple, la teruran sekecon en Somalio en la jaro 2011, la gravajn inundojn en Pakistano inter 2010 kaj 2012, tertremon en Nepalo en 2015 kaj aliajn naturajn katastrofojn kiuj, ĝis nun, provokis amason da rifuĝintoj, kiuj restis sen hejmo, sen trinkebla akvo kaj kun perdoj de la plej bazaj servoj.

Nun, klimat-ŝanĝiĝo okazigas mankon de nutraĵoj, ĉefe en la seka parto de Centrameriko, en la regiono Sahelo, en Burkina-Faso, Ĉadio, Malio, Niĝerio, Senegalo, Maŭritanio kaj ankaŭ en Madagaskaro, per teruraj sekecoj.

Tutmonda Organizo por Migradoj klasifikas klimat-rifuĝintojn laŭ tri kategorioj, jen ili:

a) Migrantoj pro subita media emerĝo, kiuj fuĝas portempe aŭ definitive (ekzemple pro tertremoj, huratanoj ktp).

b) Devigitaj migrantoj kiuj devas forlasi siajn hejmojn pro damaĝo de la mediaj kondiĉoj, kiel manko da fiŝkaptado, senarbarigo ktp.

c) Migrantoj, kiuj prognozas pri gravaj minacoj, kiel dezertiĝado, kaj pro tio ili devas forlasi siajn hemojn.

Tamen, tiuj kategorioj ĵus menciitaj, ĝis nun, aperas sur neniu leĝa teksto.

La Monda Banko jam antaŭvidis, en septembro 2021, ke ĉirkaŭ 216 milionoj da homoj povus esti devigotaj delokiĝi al aliaj partoj de siaj landoj en la jaro 2050. Tamen, la informo klarigas, ke tiu prognozo ne estas ne-ŝanĝebla, sed estus necese, ke la ŝtatoj komencus tuj malpliiigi la produktadon de gasoj kaŭzantaj forcejefikon. Kompreneble, tiuj ĉi internaj migradoj estos pli klare videblaj en la plej malriĉaj regionoj de la mondo, pli vundeblaj pro klimat-ŝanĝiĝo, nome Afriko, Latinameriko, Orienta Eŭropo kaj Centra Azio.

Unuiĝintaj Nacioj (UN) estas pli pesimisma, tiel, la tutmonda organizo asertas, ke en 2050 ekzistos mil milionoj da klimat-rifuĝintoj kaj se la ŝtatoj ne plenumigas internaciajn traktatojn, kiel tiun de Parizo pri Klimat-ŝanĝiĝo -subskribita en la jaro 2015- la nombro de tiuj rifuĝintoj povus kreski.

Tre grava novaĵo estas, ke Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN agnoskis unuafoje, ĝuste la 8-an de oktobro 2021, ke ĝui sanan kaj daŭripovan medion estas homrajto. Per la Rezolucio 48/13, la Konsilio petas al ŝtatoj kunlabori kun la celo agnoski kaj plenumi tijn homrajton, afero proponita de Kostariko, Maldivoj, Maroko, Slovenio kaj Svislando, aprobita per 43 favoraj voĉdonoj kaj 4 sindetenoj -Rusio, Hindio, Ĉinio kaj Japanio-. Ĉi tiu nova homrajto eblas pro la fakto, ke kaj Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj de UN de 1948, kaj la Eŭropa Deklaracio pri Homaj Rajtoj de la Konsilio de Eŭropo de 1950, ne limigas la nombron de tiuj rajtoj, ĉar la socio evoluas kaj la cirkonstancoj malsimilas, tiel ni nun bezonis tiun novan homrajton.

La Alta Komisiito de UN por Homaj Rajtoj, S-ino Michelle Bachelet petis al membroŝtatoj, ke ili estu rapidaj cele la efektivigon de tiu homrajto. Tamen, tiu nova rezolucio devas ankoraŭ esti debatita ĉe la Ĝenerala Asembleo de UN por ties aprobo.



S-ino Michelle Bachelet

Ni esperas, ke ŝtatoj kaj ni mem estu konsciaj pri nia agado celanta malpliigi tiujn nocajn konsekvencojn. Konvencio pri la Statuto de Rifuĝintoj, de Ĝenevo (Svislando) la 28-an de julio 1951, aprobita okaze de speciala konferenco de UN  por debati pri la statuto de rifuĝintoj kaj senŝtatuloj[1], estas la internacia traktato kiu difinas kiu estas "rifuĝinto" kaj samtempe ĝi decidas kiu rajtas ricevi azilon de la garantiantaj ŝtatoj. Kompreneble tiu teksto, en la komenco, utilis nur por eŭropaj rifuĝintoj post la Dua Mondmilito, tamen, poste, la Protokolo pri la Statuto de Rifuĝintoj de Novjorko, 1967, modifis geografiajn limigojn kaj tempojn.[2]

La Konvencio pri la Statuto de Rifuĝintoj, en sia preamblo, ligas la celojn de la Ĉarto de UN kaj tiuj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, konsiderante, ke ĉiu membroŝtato devas agnoski la socian kaj humanan

---

[1] Konferenco kunvokita de la Ĝenerala Asemblo de UN per Rezolucio 429 (V) de la 14-a de decembro 1950, ekvalidigita la 22-an de aprilo 1954. Danlando estis la unua ŝtato ratifanta la konvencion, tio okazis la 4-a de decembro 1952.

[2] Poste, ankoraŭ la Protokolo de aliro al Statuto de la Rifuĝintoj de la 7-a de aprilo 1972, naskiĝis kiam Brazilo deponis, antaŭ la Ĝenerala Sekretario de UN, la tekston la 31-an de januaro 1967. Nun 147 ŝtatoj jam ratifis ambaŭ tekstojn.

karakteron de la problemoj pri rifuĝintoj. La Alta Komisiito de UN por Rifuĝintoj prizorgos la plenumon de tiuj ĉi internaciaj traktatoj, agnoskante, ke la efektiva kunordigo de tiuj tekstoj adoptitaj dependos de la ŝtata kunlaborado.

La artikolo 1-a difinas kiu estas rifuĝinto. Temas pri tre longa artikolo, klariganta la aplikadon de tiu teksto al homoj kiuj estus konsiderataj kiel rifuĝintoj jam en la konvencioj de 1928, 1933, 1938 kaj la Protokolo de septembro 1939. La artikolo 1-a fiksas la okazintaĵojn antaŭ la 1-a de januaro 1951, kiel daton por konsideri homojn rifuĝintoj, kiuj pro certaj timoj esti persekutataj pro raso, religio, nacieco, aparteneco al kelka socia grupo aŭ politika opinio, estus for de la lando de ties civitaneco, ne povantaj reveni en tiun landon pro timo, aŭ se ili estas sennaciuloj, ili estus for de sia antaŭa restadejo kaj ili ne povus aŭ ne volus reveni pro timo. Ĉi tiu artikolo ĉesos esti aplikata al homoj, kiuj volonte akceptis la protekton de la lando de sia civitaneco, al tiuj kiuj, post la perdo de ilia nacieco, volonte reakiris ĝin; kaj al tiuj, kiuj pro la malapero de la okazintaĵoj kiuj ebligis la agnoskon de la situacio de rifuĝinto, ne povis rifuzi la protektadon de la lando de ilia nacieco.



Rifuĝintoj post la Dua Mondmilito. 1945

Kompreneble, en la momento redakti tiun konvencion ankoraŭ ne ekzistis prizorgo kontraŭ la tutmonda klimat-ŝanĝiĝo, kaj pro tio la partioj en tiu leĝa teksto nur pensis pri la konsekvencoj de la mondmilito.

Nuntempe, tri estas la ĉefaj kaŭzoj kiuj provokas translokiĝo de homoj: klimat-ŝanĝiĝo, KOVIM-19 kaj militoj. Temas pri homoj kiuj malsatas, estas malsanaj aŭ forfuĝas pro longedaŭraj konfliktoj, kiel tiuj de Demokratia Respobliko de Kongo, Afganistano, Etiopio, Sudano, Sirio, Jemeno, Pakistano, Haitio ktp.

KOVIM-19 ankaŭ negative influis en multaj landoj kaj ĝi estas la kaŭzo de malsato de milionoj da homoj, laŭ FAO, la Organizo pri Nutrado kaj Agrikulturo de UN. Same, militoj, kaj ĉefe la jam nomataj "hidromilitoj", provokas mankon de akvo, plejfoje inter landlimaj landoj, pro la uzo de akvorezervujoj. Tiel, la usona Prezidento J.F. Kennedy saĝe asertis, ke "tiu, kiu estos kapabla solvi la problemojn pri akvo, estos meritoplena al du Nobel-

premioj, unu pro scienco kaj alia pro paco". Eŭropa Komisiono jam avertis pri la milit-risko pro manko de akvo, ĉefe en la plej feblaj medioj de ĉi tiuj kvin riveroj: Nilo, Ganto, Tigriso, Induso kaj Kolorado, kvankam nun, laŭ UN ekzistas pri ol 300 konfliktoj pro akvaj problemoj.



Akvo, ĉu kaŭzo de ontaj militoj?


Eŭropo ne estas for de tiu problemo. Ekzemple, dum la nuna milito en Ukrainio, provinco Ĥersono estis unu el la ĉefaj celoj de Rusio dum la unuaj atakoj, temas pri grava loko pro la fakto, ke tie troviĝas la kanalo de Nord-Krimeo, hidraŭlika infrastrukturo el kie devenas 85% de la akvo bezonata de la Krimea duoninsulo. Post la aneksado de Krimeo al Rusio en la jaro 2014, Ukrainio fermis ĝin, tio provokis mankon de akvo al la regiono aneksiita de Rusio.

Alie, riveroj kiel Pado, kies valo en Italio suferis pro altaj temperaturoj, tie pluvo malpliiĝis 20%-ope kaj la sala akvo eniris en la riveron pro plialtigo de la marnivelo. Rivero Doŭro, kiu naskiĝas ĉe la unua vin-produkta regiono en la mondo, trakuras poste en du landoj: Hispanio kaj Portugalio, ĝi suferas poluadon. La rivero Tamizo, la plej longa rivero de Anglio kaj simbolo de la urbo Londono, havas gravan problemon pro abundo de plastikaĵoj. La rivero Ŝeldo en Belgio, Laŭro en Francio aŭ Rejno kaj Elbo en Germanio, kie altaj someraj temperaturoj malpliigas ties akvo-kvanton kaj pro tio la navigado tra ili estas minacata. Rivero Volgo, kiu trapasas kvar respublikojn de la Rusa Federacio, kun 3530 km-oj, antaŭtempe estis riĉa je fiŝoj, kiel sturgoj, tamen nun pro la poluado, ĉefe petrolo, havas ĥaosan situacion. Laŭ oficialaj informoj, en la riveron Volgon estas ĵetataj inter 10 kaj 11 tunoj da poluaj substancoj. Tamen, malgraŭ ĉi ĉio, tio ne provokas konsekvencojn pri klimat-rifuĝado.

Same, la akvo-fandiĝo de la Arkto povas kaŭzi estontajn konfliktojn inter landoj pro la dezirinda dolĉa akvo, kiun ĝi enhavas.

Tamen, kiel sciigis al la membro-ŝtatoj de UN la Alta Komisiito por la Homaj Rajtoj, S-ino Michelle Bachelet, tiu tikla situacio povus ŝanĝiĝi se ili efektivigas drastajn rimedojn kun la celo plibonigi la medion kaj tiel mildigi la klimat-ŝanĝiĝon.

Oni supozas, ke la plej malfacilaj momentoj por enmigrado kaj elmigrado okazos ĉirkaŭ la jardeko de 2050, konsiderante la malrapidan evoluon de la klimat-ŝanĝiĝo. Pro tio, ekde nun, oni jam devas plani por realigi ordigitan migradon, kaj tiel efektivigi bonan evoluon de la problemo. Do, estas fundamenta afero plenigi la Celojn por Daŭripova Evoluigo dum la venontaj dek jaroj kaj estontece.[3]




Grafika komparo de la fandiĝo ĉe la Norda Poluso dum la lastaj jardekoj.

Estas esence malpliigi tutmondajn elsendojn de forcejefikaj gasoj cele al la mildigo de la efekto kiuj kaŭzas varmigadon de la terglobo, laŭ la Traktato pri Klimat-ŝanĝiĝo de Parizo 2015.[4]

[3] UN lanĉis 17 "Celojn por Daŭripova Evoluigo", en la jaro 2015, per aprobo de siaj membroŝtatoj kiel bazon de la evoluiga strategio de UN dum la periodo 2015-2030.

[4] Traktato adoptita de 196 landoj, en Parizo la 12-an de decembro 2015, kaj kiu ekvalidiĝis post ratifo de Eŭropa Unio, la 4-an de novembro 2016 (COP 21).

La celo estas limigi tutmondan varmigon sub 2 centigradoj kaj se tio eblas eĉ 1,5. Ĉiu ŝtato devas bone prizorgi la migradon pro klimataj kialoj kaj ankaŭ pliigi la financadon por pli favora evoluo de la klimato kaj de la klimat-rifuĝintoj. Kvankam tio ĉi ŝajnas esti urĝa alvoko, vere ne estas nova ĉi averto pri tiuj konsekvencoj. Jam la Ĉarto de la Tero, deklaracio pri bazaj etikaj principoj por tutmonda daŭripova evoluo, de la jaro 2000, avertis pere de siaj 16 principoj, pri la jam aktualaj riskoj.[5]

Pli frue, en 1987, Monda Komisiono de UN pri Medio kaj Evoluo, konata kiel "Brundtland komisiono", en sia fina rezolucio proponis tiun Ĉarton por gvidi la transiron al daŭripova evoluigo. Kaj tiel avangarda estis tiu Ĉarto, ke ties 16 principoj utilis por redakti la aktualajn Celojn por Daŭripova Evoluigo (Agendo 2030) de UN, ĉar tiuj principoj kaj jenaj celoj tute koincidas.

[5] La oficiala lanĉo de la Ĉarto de la Tero okazis la 29-an de juno 2000, kiam UNESKO enmetis la lastajn aldonaĵojn.

*Kunlaboru kun*

***JURA TRIBUNO INTERNACIA***

Se vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj.

**Artikoloj:** inter 4 kaj 10 foliojn A4 (unuflanka duobl-spaca).

**Recenzoj:** vi povas paroli pri legita libro. La verko elektota devas temi pri jura afero, kvankam ne necese pri/en en esperanto.

**Informoj:** vi povas informi pere de ĉi tiuj paĝoj pri juĝoj, novaj leĝoj, internaciaj aferoj, traktatoj ktp. Same, pri kelka afero rilata al Juro en via lando aŭ komunumo. La informoj devas ampleksi inter 1 kaj 3 foliojn.

Adresoj de la redakcio: Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

jurista@esperanto.ac

Internacia Jurista Esperanto-Asocio

I.J.E.A. Revuo




JURA
TRIBUNO
INTERNACIA §

N-ro 18
Jaro 2019
Internacia Jurista Esperanto-Asocio

**Kio estas la Internacia Jurista Esperanto-Asocio ?**

***Jura Tribuno Internacia***
Oficiala organo de IJEA

## Juraj Universalaj Tekstoj

Ĉi tie vi trovos la tradukon en Esperanton de gravaj internaciaj juraj tekstoj.

www.esper



## Libroj eldonitaj

Inter la celoj de IEAJ troviĝas la publikigo en Esperanto de verkoj rilataj al juro.




## Statuto de IJEA

Valida ekde la aprobo de la asemblea kunsido de 24.07.2016 okazigita en Nitro (Slovakio)





## Vortaro

Jura Terminologio

## Kursoj

- Kurso pri Internacia Mar-Juro



## Nia celaro

Jen la celoj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio.

antojuro.org



## Fariĝu membro de IJEA !

Se vi laboras aŭ rilatas al juraj medioj, ne hezitu: vi povas ĉef-roli en IJEA.

## Estraro de IJEA




Jura Fakultato en la Universitato de Kostariko





# Juraj Informoj

## • Sud-korea tribunalo juĝas mon-kompensi eksajn seksajn sklavinojn.

Sud-korea tribunalo juĝis, ke Japanio devas mon-kompensi 16 virinojn kiuj estis viktimoj de seksa sklaveco dum la Dua Mondmilito. Ĉi tiu verdikto apelacie nuligis alian de suba tribunalo, kiu malakceptis tiun peton. La Supera Tribunalo de Seulo, sud-korea ĉefurbo, ordonis kompensi ĉiun virinon per 145.000 dolaroj.

Laŭ la tribunalo, tiuj viktimoj estis "perforte kidnapitaj kaj devigitaj agadi kiel seksaj sklavinoj", kiel rezulto ili suferis moralan damaĝon, do, ili ne kapablis sekvi normalan vivon post la milito. Lee Young, nuntempe 95-jaraĝa, estis unu el tiuj 16 plendantoj kaj ŝi montris sian feliĉon tuj post eliri el la tribunalo.



S-ino Lee Young, eksa korea seksa sklavino.

Laŭ historiistoj, eĉ 200.000 virinoj, plejmulte el ili koreino, estis devigitaj agadi kiel prostituitinoj por la japanaj soldatoj dum la milito. Japanio koloniis la korean duoninsulon de 1910 ĝis 1945. Ĉi tiu situacio difektis la rilatojn inter Sud-Koreio kaj Japanio eĉ post la fino de la milito. Nur en 1965 kaj pere de traktato, ambaŭ ŝtatoj ekrilatis reciproke, same Japanio havigis kiel kompenson al Sud-Koreo 800 milionojn da dolaroj.

Japanio konsideras, ke tiu traktato kaj ankaŭ la mono pagita, metis finan punkton al ĉiuj reklamacioj pro damaĝoj okazigitaj dum la kolonia periodo. Tiel, la ministro pri Eksteraj Rilatoj de Japanio, S-ino Yoki Kamikawa, asertis post koni la verdikton, ke ĝi estas kontraŭa al internacia juro kaj al traktatoj

- **Informadikaj kompanioj ne respondecas se ties kanaloj estas uzataj de teroristoj.**

Usona Supera Tribunalo pravigis informadikan kompanion Twitter (nune X), al kiu oni petis respondecon, ĉar iliaj kanaloj estis uzataj de teroristoj por komuniki inter si. Nun, juĝistoj de tiu supera tribunalo rifuzis en apelacio la ideon, ke tio egalas al kunlaborado kun terorismo. Laŭ la Supera Tribunalo, se teroristoj uzas sociajn retejojn, tio ne povas signifi, ke tiu kompanio respondeciĝas pri kunlaborado kun la terorismo.



La kazo juĝita, Twitter kontraŭ Taamneh, pritraktis plendon de familiano de viktimo de terorista agado en la diskoteko Reina en Istambulo, tie mortis 39 homoj okaze de atako al festo dum la lasta nokto de la jaro 2016. Dum la polica esplorado oni eltrovis, ke teroristoj komunikis inter si pere de Twitter. Sed laŭ la juĝo de la Supera Tribunalo, tiu informadika kompanio ne respondeciĝas pri tiu agado.


La verdikto de la unua-instanca tribunalo estis kontraŭa al la kompanio, tamen nun la Supera Tribunalo nuligis tiun unuan juĝon kaj samtempe ĝi establis jurisprudencon pri ĉi tiu afero okaze de ontaj novaj plendoj.

- **Privatuloj ne rajtas oponi al suverena decido de ŝtato, laŭ la Eŭrop-Unia Justica Tribunalo.**

"La ĉeso de la konsidero kiel civitano de Eŭropa Unio kaj, kompreneble, ankaŭ de la rajtoj ligitaj al tiu situacio, estas aŭtomata konsekvenco de la decido adoptita, suverenece, de Britio, kaj ne de decido de la Konsilio de la Eŭropa Unio aprobanta tiun forlason".

Tion deklaris la Justica Tribunalo de Eŭropa Unio okaze de ĵusa juĝo, pere de kiu oni rifuzas apelaciojn prezentitajn de britaj civitanoj, ili atentigis pri la fakto, ke post *Briteliro* ili estis senhavigitaj de sia kondiĉo kaj statuto kiel eŭropaj civitanoj.

Okaze de la referendumo organizita en Britio en la jaro 2016, plejmulto el la voĉdonantoj montris sin favoraj eliri el Eŭropa Unio, konsekvence, Britio informis al Eŭropa Konsilio pri sia deziro forlasi la Union. Sekve, reprezentantoj de Britio kaj de Eŭropa Unio aprobis akordon kiun efektivigis la Unio pere de sia decido de la 30-a de januaro 2020. Tiel, Britio definitive forlasis la Eŭropan Union la 31-an de januaro 2020.




Tri britaj civitanoj prezentis plendon antaŭ Eŭrop-Unia Tribunalo, ĉar laŭ ili, la decido de la Konsilio de la Eŭropa Unio senigis al ili je pesona statuto kiel eŭropanoj. La Ĝenerala Tribunalo decidis unua-instance, ke tiuj plendoj ne povus esti pristuditaj dum proceso antaŭ la Justica Tribunalo.

Nun, la Justica Tribunalo de Eŭropa Unio, kiel verdikto al la apelacioj prezentitaj de tiuj britaj civitanoj, konfirmis la decidon de la unua-instanca tribunalo, do, oni konsideras ne-admiseblaj tiujn plendojn. Laŭ la Tribunalo, la decido forlasi Eŭropan Union fare de membro-ŝtato, estas afero kiu apartenas ekskluzive al la ŝtata suvereneco. Do, la perdo de la statuto de civitano de la Unio, suferita de tiuj britaj civitanoj, estas logika rezulto de suverena decido adoptita de ŝtato, kaj ne konsekvenco de akordo aprobita de la Konsilio de Eŭropa Unio. Tiel, la Justica Tribunalo konsideras, ke britaj civitanoj ne rajtas prezenti plendon kontraŭ decido adoptita de suverena ŝtato.

# Koŭto Miksta.
# Antikva "ŝtato" inter Portugalio kaj Hispanio

Ne-preciza difino de landlimoj estis, kaj ankoraŭ estas nuntempe, kaŭzo de gravaj problemoj kaj eĉ militoj dum la tuta historio. Tiuj landlimoj fiksitaj mezepoke ne estis tute klaraj, do, landoj luktis inter si pro tiuj teritorioj. Malofte okazis kontraŭaj aferoj, tio estas, restis teritorioj tute forgesitaj,super kiuj neniu el la apuda ŝtatoj realigis sian suverenecon. Ĝenerale, enloĝantaroj de tiuj ter-pecoj profitis tiun situacion, tiel, ili prenis avantaĝojn de landlimaj ŝtatoj kaj forgesis eblajn devojn kiel civitanoj de unu el tiuj apudaj landoj.




Tio okazis en "forgesita" teritorio inter Hispanio kaj Portugalio, tiu ter-peco estas konata kiel *Coto Mixto* en la hispana lingvo, *Couto Mixto* en la portugala kaj *Couto Misto* en la galega lingvoj -Koŭto Miksta en esperanto-. La afero komenciĝis en la 12-a jarcento, kiam la Traktato de Zamoro, subskribita de la reĝo Alfonso la 7-a de Leono kaj Alfonso la 1-a de Portugalio, difinis, iamaniere, landlimojn inter ambaŭ regnolandoj en la Ibera Duoninsulo.

Kompreneble, tiuepoke ne ekzistis tute ekzaktaj landkartoj, do, la landlimo trakuris tra bienoj kaj ter-pecoj ofte tute ne konkrete. En punkto de la landlimo inter Leono kaj Portugalio ekzistis malgranda ter-perco tuj apud rivero Salas, super kiu neniu el ambaŭ regnolandoj efektivigis sian suverenecon. Temas pri tri vilaĝetoj: Rubias dos Mixtos, Meaus kaj Santiago de Rubiás, ĉi lasta estis la plej "granda" en tiu regioneto, kvankam entute la teritorio mezuris 27 kvadratajn kilometrojn kun proksimume mil enloĝantoj.



Preĝejo de Santiago de Rubiás. Kunvenejo de la reprezentantoj de Koŭto Miksta.

Nek Leonaj, nek Portugalaj aŭtoritatuloj depostulis al si tiun teritorion, do, post kelkaj jaroj enloĝantoj de tiu teritorio alkutimiĝis esti nek hispanoj, nek portugaloj, aŭ male, ili estis hispanoj kaj portugaloj samtempe. Ili povus libere elekti sian civitanecon kaj rifuzi tiun elekton kiam ajn. Tiel, ili profitis la plej bonajn aferojn de ambaŭ landoj kaj samtempe ili rajtis rifuzi kiun ajn devigon. Ekzemple: ili ne estis devigitaj servi en la armeo, pagi impostojn ktp.

Kiu ajn povus peti azilon en Koŭto Miksta, se oni deziris eviti la justicon de Portugalio aŭ de Hispanio, kvankam tio ne povis okazi se temis pri "sang-deliktoj". Same, enloĝantoj de tiu ter-peco ankaŭ ĝuis "ekster-teritoriajn" rajtojn kiam ili trapasis la tiel nomata "Privilegiita Vojo", kiu unuigis la teritorion kun la apuda portugala vilaĝo Tourém. Tio estis, ekzistis neniu fiska aŭ komerca kontrolo en la teritorio, kie oni povis vendi produktojn kiuj havis altajn impostojn en Portugalio kaj en Hispanio, ekzemple tabako. Ĉi ĉio provokis, ke la teritorio kaj la privilegiita vojo estis agad-loko de kontrabandistoj.

El la politika vidpunkto, ĉiu vilaĝeto rajtis elekti reprezentanton kiu agadis dum tri jaroj. Do, ekzistis tri "homo de acordo" (homoj de akordo), kiuj siafoje elektis supreman aŭtoritaton aŭ "xuiz" (juĝisto). Ĉiu "homo de acordo" estis la posedanto de ŝlosilo, pere de kiu oni povis malfermi kofron, kie troviĝis ĉiuj gravaj dokumentojn de la teritorio. Ĉi tiu kofro nuntempe estas konservata en la preĝejo de Santiago de Rubiás.

En la jaro 1864 Hispanio kaj Portugalio subskribis akordon por fiksi ekzakte kaj definitive siajn internaciajn landlimojn, de la rivero Minjo en la nordo ĝis la rivero Gvadiano en la sudo. Tiam, oni konstatis la ekziston de ĉi tiu


*stranga* regioneto. Aŭtoritatuloj de ambaŭ ŝtatoj decidis meti finan punkton al ĝi. Koŭto Miksta dividiĝis inter Hispanio kaj Portugalio. En Hispanio restis tiuj tri vilaĝoj kaj en Portugalio senhoma ter-strio, kiu hodiaŭ apartenas al la portugala municipo de Montealegre.




Monumento memore al Delfím Modesto Brandão (Tourém 1835 - Portoriko 1885),
lasta *xuiz* -suprema aŭtoritato- de Koŭto Miksta
inter la jaroj 1863 kaj 1865.

Ĉe la ret-paĝo
https://www.ivolapenna.org/verkoj/verkoj2.htm

estas libere legebla la libro de la D-ro Ivo Lapenna *"Juraj Terminologiaj Problemoj kun aparta konsidero al Esperantlingva Jura Terminologio"*, eldonita kiel kontribuo al la Jubilea Esperanto-Jaro en 1987.



JURAJ TERMINOLOGIAJ PROBLEMOJ

Kun Aparta Konsidero al
Esperantlingva Jura Terminologio

de

Prof. D-ro Ivo Lapenna
(Universitato de Londono)

Kun Antaŭparolo
de
D-ro Klaus Perko

Kontribuo al la Jubilea Esperanto-Jaro 1987

Eldonita de
Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ)
1987

NOVELO

# La kazo de la avara panisto

Lukas Toczki

La kazo de la avara panisto estas miksaĵo el legendo, literaturo kaj realo, tamen tutcerte, ĉi tiu historio devus aperi sur la enciklopedio de legendaj verdiktoj, iam verkota.

Foje, loĝis en granda vilaĝo tre fama panisto. Liaj panoj kaj kukoj estis konataj en la tuta regiono. Homoj luktis ĉiumatene por aĉeti liajn produktojn kiuj inundis per sia delica aromo la stratojn ĉirkaŭantajn la pan-vendejon. Ankaŭ ĉiutage junulino staris antaŭ la enir-pordo de vendejo. Vere, ŝi ĝenis neniun, ŝi simple staris tuj apud la pordo kaj en la distanco la junulino vidis, de tempo al tempo, la panojn kaj kukojn ellaboritajn de la panisto. Ŝi malfermis siajn naz-truojn kun la celo flari la gustumindan aromon de la panoj ĵus bakitaj. La junulino ne havis monon, do, estis sufiĉe por ŝi flari la aromon kiu libere vagadis tra la aero.




Tagon post tago la pan-vendisto rigardis la junulinon. Vere, ŝi ĝenis neniun, tamen ŝia konstanta ĉeesto tuj apud la enir-pordo estis stranga kaj ne-komprenebla afero por la panisto, tiel, tagon la panisto eliris el la vendejo kaj li rekte demandis al ŝi:

- *Kara, kion vi faras ĉi tie, stare, ĉiumatene tagon post tago?*

- *Ho, kara panisto* -ŝi respondis- *vi fabrikas la plej bongustan panon en la mondo, mi ĉiumatene ĝuas flarante viajn produktojn.*

- *Ĉu vi ne deziras aĉeti panon aŭ kukon?* -la panisto demandis.

- *Ne, bedaŭrinde monon mi ne havas. Por mi estas sufiĉe percepti la delican flaron de via ĵus bakita pano.* -la junulino respondis.


Krom lerta panisto, li estis la plej avara kaj mon-avida homo en la mondo. Do, en tiu ĝusta momento li pensis:

- *Tiu junulino ĝuas per miaj ellaboraĵoj. Ŝi certe neniun ĝenas, eĉ ne min mem. Tamen, oni devas agnoski, ke ŝi eltiras profiton el mia laboro, eĉ se nur temas pri flarado de la aromo de miaj panoj.*

Post kelkaj  horoj li kontaktis kun sia advokato.

- *Tiu junulino* -li sciigis al la advokato- *eltiras profiton el mia laboro, tamen, ŝi pagas nenion al mi.*

La advokato pristudis la kazon, li konsilis al la panisto prezenti plendon kontraŭ la junulino en la juĝejo, tiel oni povus atingi iom da mono pagota de ŝi pro la profito eltirita de la laboro de la panisto, eĉ se nur temis pri flarado de aromo. Tion li faris.



La proceso komenciĝis post kelkaj semajnoj. Unue, juĝisto pridemandis la paniston:

- *Nu, vi diras, ke tiu junulino eltiras profiton el via laboro, pro la fakto, ke, kvankam ŝi ne manĝas vian panon, ŝi flaras ties aromon, do, laŭ via opinio, ŝi devas pagi ion al vi, ĉu ne?*

- *Jes, via moŝto* -respondis la panisto-. *Ekzistas nenia dubo, ŝi eltiras profiton el mia laboro tute senpage.*

- *Kaj laŭ via opinio, kiom da mono ŝi devus pagi al vi?* -denove demandis la juĝisto-.

- *Nu, averaĝe ŝi estas dum 30 minutoj stare ĉe la pordo de mi vendejo. Do, mi kalkulas, ke estus ĝuste peti al ŝi tri arĝent-monerojn* -respondis la panisto kun horloĝo enmane-.

Poste, la juĝisto vokis la junulinon, li demandis ŝin:

- *Ĉu vi konsentas, ke vi senpage flaras ĉiumatene la aromon de la pano ellaborita de la panisto?*

- *Jes, via moŝto -ŝi respondis-. Tion mi faras, mi ne havas monon, do mi povas fari nenion pli ol flari lian gustumindan kaj delican panon.*

- *Kaj ĉu vi tion faras ĉiumatene dum 30 minutoj?* -demandis la juĝisto-.

- *Jes, via moŝto. Proksimume dum tiu tempo* -estis la respondo de la junulino, kiu evidente ne havis horloĝon enmane.

Dum sia longa profesia kariero la juĝisto partoprenis en procesoj pri grandaj heredaĵoj. Ankaŭ pri aĉet-vendado de vastaj bienoj, kies prezo nur oni povus kalkuli per granda kvanto da or-moneroj. Tamen, unuafoje, kaj post multaj jaroj, li devis decidi tre simplan aferon, kie la plendanto petis nur la pagon de tri arĝent-moneroj. Malgraŭ tio, la juĝisto komprenis, ke tiu devus esti la plej ellaborata kaj pristudata decido dum sia longa kariero. 

Post kelkaj semajnoj kaj post konsulti la plej dikajn volumojn pri jur-scienco, la juĝisto sciigis, ke li jam redaktis la verdikton. Do, la juĝeja oficiro alvokis al la partioj por aŭskulti la juĝon.




*Unue,* -la juĝisto ekdiris- *ĉi tiu kazo estos memorata dum multaj jaroj, pro la afero petita de la plendanto kaj pro la malgranda mon-kvanto celita.* Post tio, li prononcis laŭte sian verdikton:

*Nu, la junulino akceptas, ke ŝi flaras la odoron de la pano kaj nur tio jam estas granda plezuro por ŝi. Ŝi agnoskas ankaŭ, ke ŝi nenion pagas al la panisto. Vere, mi opinias, ke la*

*panisto meritas pagon, ĉar sen lia laboro la junulino ne povus flari la panon ĉiumatene. Tiel, laŭ ĉi tiu, mia verdikto, la junulino devos alporti tiujn tri monerojn petitajn de la panisto.*

La panisto kaj lia advokato ridetis, ili sukcesis en sia plendo. Okazis tiam, ke ĉe la juĝejo mem troviĝis kelkaj amikoj de la junulino, kiuj sukcese kolektis, kun granda peno, tri arĝent-monerojn. Ili havigis la monon al la junulino, tiel ŝi povus pagi la mon-kvanton fiksitan en la verdikto.

La panisto, ege feliĉa, malfermis sian poŝon, li estis preta ricevi la monerojn. La junulino etendis sian manon kun tiun tri arĝent-monerojn por havigi ilin al la panisto.



- *Kion vi faras?* -Ekkriis la juĝisto alparolante la junulinon.

- *Mi plenumas vian verdikton. Mi pagas ĉi tiujn tri monerojn al la panisto* -respondis la junulino-.

- *Ne!* -respondis la juĝisto- *Mi neniam diris, ke vi devas havigi tiujn monerojn al la panisto, mia verdikto diras nur, ke vi devas alporti tri arĝent-monerojn, kaj vi tion jam faris.*

- *Do, kion mi devas fari nun per ĉi tiuj moneroj?* -demandis la junulino-.

- *Prenu ilin* -respondis la juĝisto- *kaj en via mano tintigi ilin. La pago ricevota de la panisto estos la sono de tiuj tri moneroj, ĉar se vi ĝuas per la flarado de la pano, li ricevos kiel pagon la tintadon de la moneroj.*

Laŭdire, la junulino dum multaj jaroj, tagon post tago, ĉiumatene staris ĉe la pordo de la pan-vendejo. Ŝi, kun feliĉa mieno, flaris la plej bongustan panon kaj post 30 minutoj, ŝi tintinigis tri arĝent-monerojn en sia mano. Tiel, dank'al la saĝa verdikto de juĝisto, sensaĵo estis pagata per alia sensaĵo.

**FINO**




Jura Fakultato en la Universitato de Stokolmo
(Svedio)






# *Bezono ne havas leĝon*

Ĉiuj juraj sistemoj baziĝas sur leĝaro, kiun ĉiuj civitanoj, ankaŭ la politikaj povoj, devas obei. Do, ne povas ekzisti diferencoj por unu aŭ alia homoj kiam oni aplikas leĝon. Tamen, ekzistas kondiĉoj kaj cirkonstancoj en kiuj sama ago devas esti punita aŭ ne, do, estos juĝisto mem kiu devas interpreti la leĝon en ĉiu momento.

Ni vidu ekzemplon, se iu forprenas pomon por vendi ĝin kaj tiel atingi iom da mono, li meritus pli gravan punon ol tiu kiu ŝtelas pomon ĉar li malsatas, do tiu frukto eble estos lia ununura manĝaĵo en la tago. Reale, ambaŭ aferoj estas similaj: forpreno de pomo, tamen, la jura respondo ne povas esti simila. Ni troviĝas antaŭ la principo: "Bezono ne havas leĝon".



La principo *Necessitas caret lege* (Bezono ne havas leĝon) estis proponita unuafoje en la antikva Romo de la latina juristo Pubilio Sirio (85 - 43 a.K.). Ĝi utilis por montri, ke en okazo de neceso, kelkaj aktoj ne devas esti konsideritaj kiel deliktoj. Leĝo-farantoj estas konsciaj, ke homo povas travivi malbonajn situaciojn, ĉu personajn ĉu ekonomiajn, do, tio estus kaŭzo de agoj komprenataj kiel kontraŭ-leĝaj kondutoj, ekzemple: forpreno de manĝaĵo se li malsatas. Tiel, se iu estas arestita okaze de tiu delikto, tribunalo devas preni en konsideron ĉiujn sociajn, personajn, ekonomiajn kaj familiajn cirkonstancojn de la akuzito, do, oni povas puni per malgranda sankcio aŭ eĉ konsideri, ke ne ekzistis delikto.

Jur-scienco jam pritraktis jenan temon, tiel, ĉi tiu forpreno estas nomata "pro-malsata ŝtelo". Temas pri forpreno de bazaj necesaĵoj, plejofte nutraĵoj sen

uzo de trompo, malico aŭ perforto, kun la celo satigi personajn aŭ familiajn bezonojn en tiu momento. Ĝenerale, ĝi estas konsiderata kiel absolva cirkonstanco, tamen ne ĉiuj jur-sistemoj tion agnoskas.

Nepraj elementoj de pro-malsata ŝtelo estas:

- temas pri forpreno de io apartenanta al alia homo aŭ institucio.
- Ago ne povas esti plenumita per trompo aŭ perforto.
- Tiu ago devas okazi nur unufoje.
- Objektoj forprenitaj devas esti bazaj necesaĵoj.



Ni parolis pri forpreno de bazaj necesaĵoj, ekzemple: ŝtelo de pomo por manĝi, tamen, ĉu ĉi tiu principo povus esti aplikata nuntempe por pli "multekostaj" aferoj? Ni pripensu la ekonomian krizon travivitan antaŭ kelkaj jardekoj, aŭ eĉ nun ekzistantan en la mondo. Pro tiu krizo, multaj familioj ĉesis pagi hipotekajn monŝuldojn, simple ĉar ili ne disponis pri sufiĉaj ekonomiaj rimedoj, ekzemple pro senlaboreco okazinta dum la ekonomia krizo.

Ofte, bankoj vendis aŭkcie la nemoveblaĵon ŝarĝitan per hipoteko apenaŭ kontraŭ la 50% el la valoro de la ŝuldo. Do, tiu banko daŭre postulis la pagon de la cetera ŝuldo, eĉ post forigi de la ŝuldanto la familian domon. Rilate al tio, kelkaj tribunaloj en Hispanio aplikis la principon "bezono ne havas leĝon", tiel oni nuligis la ŝuldon post la havigo de la nemoveblaĵo al banko, kun la klarigo, ke tiuj monaj institucioj realigis kontraŭ-socian kaj ekscesan praktikadon de la juro.

# Galerio de elstaraj esperantistaj juristoj



## José Garzón Ruíz

Hispanio 1871 ~ 1955

Advokato (1892), juĝisto (1897-1911), urbestro de San Fernando (provinco Kadizo en Hispanio), delegito kaj prezidanto de la loka sekcio de la Ruĝa Kruco, skoltisto. Esperantisto, fondinto kaj direktoro de la revuo *Gazeto Andaluzia* (1910) kaj *Gazeto Hispana* (1911), aŭtoro de lernolibro de la internacia lingvo.



# Kino kaj Juro



## Muzik-skatolo

Anne Talbot (Jessica Lange) estas prestiĝa advokato en la usona urbo Ĉikago, ŝi fakas pri jur-punaj aferoj. Ŝi havas filon kaj siafoje ŝi estas filino de Mike Laszlo (Armin Mueller-Stahl), hungara enmigrinto en Usono post la dua mond-milito. Li apartenas al grupo de hungaraj ekzilitoj tute kontraŭaj al komunisma reĝimo en Hungario.




Laszlo estas rekonita de ĵurnalisto kiel antikva kunlaboranto de la nazioj dum la milito, laŭ li, Laszlo apartenis al hungara faŝisma politika partio "Saga Kruco", kaj dum la lastaj tagoj de la milito li, sub la nomo Mishka, torturis, perfortis kaj sadisme murdis dekojn da judoj kaj ciganoj kaj tiujn kiujn ilin protektis. Do, li estas akuzita pri krimoj kontraŭ la homaro. Tuj la hungara registaro petas lian ekstradicion.

Laszlo firme insistas, ke temas pri identig-eraro. Lia filino, Anne Talbot, decidas defendi sian propran patron. Kontraŭe, la prokuroro Jack Burke (Frederic Forrest) asertas, ke Mike Laszlo reale estis tiu terura eks-komandanto

---

*Music box.* (1989) Produktita de Irwin Winkler. Reĝisorita de Costa-Gavras. Ĉefaj aktoroj: Jessica Lange, Armin Mueller-Stahl, Frederic Forrest, Lukas Haas,

Mishka dum la lastaj tagoj de la Dua Mondmilito en Budapeŝto. Dum la esploroj de la prokuroro, oni eltrovas, ke Laszlo havigis multe da mono al alia hungara enmigrinto, Tibor Zoldan, kiu ĵus forpasis okaze de stranga surveturo, tiam ne estis eble trovi kulpanton. Laszlo asertas, ke tiuj pagoj certe estis pruntedonoj al amikoj kiuj trapasis malfacilajn ekonomiajn momentojn.




Anne Talbot (Jessica Lange) defensas sian patron dum la jura proceso

Ĉe la tribunalo deklaras kiel atestantoj eksaj viktimoj, ili asertis, ke Laszlo estis tiu Mishka. Male, li asertas, ke ĉio estas agado de la hungara komunisma registaro, kun la celo venĝi la suferitajn kontraŭ-komunismajn agadojn en Usono de politikaj ekzilitoj. Defendanto eĉ trovas eksan sovetan spionon, kiu diras, ke la soveta polico planis falsi identig-dokumentojn por akuzi kontraŭ-komunistojn kaj tiel akuzi ilin esti naziaj eksaj kunlaborantoj.

Prokuroro proponas deklaron de homo, kiu pro malsano ne povas eliri el Budapeŝto. Do, juĝisto, defendanto kaj prokuroro vojaĝas en la hungaran ĉefurbon por aŭskulti tiun atestanton. Kompreneble, Mike Laszlo ne iras, li timas esti arestita de la hungaraj aŭtoritatuloj. En Budapeŝto Anne sukcesas pruvi antaŭ la juĝisto, ke tri pliaj homoj jam estis identigitaj kiel tiu mistera Mishka, do, sendube tiu nova identigo rilate ŝian patron povas esti eraro. Fine, juĝisto malakceptas la denuncon, tiel neniu akuzo minacas jam al Laszlo.

Ankoraŭ en Budapeŝto Anne decidas viziti la fratinon de Tibor, ŝi suspektas, ke verŝajne la amiko de ŝia patro iamaniere ĉantaĝis lin kaj pro tio Tibor ricevis tiom da mono. Ĉe la fratino de Tibor, Anne rigardas antikvan fotografaĵon, tie aperas Tibor en uniformo de la grupo kunlaboranta kun nazioj.

Antaŭ ol reveni en Usonon, Anne ricevas peton de la fratino de Tibor. Ŝi deziras repreni ĉiujn objektojn lombarditajn de sia frato en Ĉikago, ŝi havigas al Anne la depon-bileton. Anne plenumas la peton. Inter la objektoj reakiritaj, kiuj apartenis al Tibor, troviĝas muzik-skatolo, ene de ĝi aperas kelkaj antikvaj fotografaĵoj. Inter ili, ŝi vidas kelkajn fotojn de sia patro en nazia uniformo torturante homojn en Budapeŝto.



Prokuroro Jack Burke (Frederic Forrest) prezentas pruvojn kontraŭ Mike Laszlo

Tiam, Anne komprenas ĉion, ŝia patro estis la terura komandanto de la nazia grupo. Ŝi akuzas lin pri tiu teruraj aktoj, eĉ pri la murdo de Tibor, kiu povus deklari kontraŭ li. Laszlo defendas sin, laŭ li komunistoj infektis sian filinon per tiuj ideoj kiam ŝi estis en Budapeŝto. Sed, ŝi decidas rompi kiajn ajn rilatojn kun sia patro, samtempe ŝi sendas la fotografaĵojn al prokuroro.

Vere, la filmo esence pritraktas jur-procesajn aferojn, ne nur debaton pri kulpo aŭ sen-kulpeco. Ene de ĝi aperas oftaj materialoj de ĉi tiaj filmoj, tio estas, lastmomentaj pruvoj, surprizaj atestantoj, senkreditigo de ne-konvenantaj atestantoj ktp. Ĉi tiu filmo, kies direktoro estis la prestiĝa Costa-Gavras, prezentas dramajn aferojn, ĝi estas tre bone konstruita, kun aktoroj kapablaj komuniki emociojn. Alie, estas tre grava la dokumenta prezentado de tiuj fi-agoj okazintaj dum la lastaj tagoj de la nazia okupo de Budapeŝto. La filmo atingis "Oran Urson", la unua premio en la Kin-Festivalo de Berlino en la jaro 1990.

## ALIĜU AL

## INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO

Kiu rajtas esti membro de I.J.E.A.?

- Ordinara membro: devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri Juro.
- Membro-studento: devas studi por licenciiĝo pri Juro.
- Membro-staĝanto: devas staĝi en jura profesio.
- Membro-korespondanto: devas utile kunlaboradi kun la Asocio, ĉu esperanto, ĉu alilingve, jen spontane, jen laŭ invito de la Asocio.

Kiel aliĝilo plenumu la sekvantan paĝon kaj sendu ĝin al *jurista@esperanto.ac*

Kotizoj.

La jara kotizo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latin-Ameriko. Se vi loĝas en alia lando la kotizo estas 14 eŭrojn.

Membro-studentoj aŭ membrostaĝantoj pagas neniom.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r. Ankaŭ oni povas aboni la jaran kotizon rekte okaze de la Ĝenerala Asembleo kiu ĉiu-jare okazas kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.

Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al nia adreso: jurista@esperanto.ac

# Internacia Jurista Esperanto-Asocio
# I.J.E.A.

## ANIĜILO / MEMBRILO

Antaŭnomo:

Familia nomo:

Profesio:

Foto

Poŝtadreso:

Retadreso: @

Urbo:

Lando:

Nacieco:

Kategorio de estonta asociano: ordinara asociano ☐ jurstudento ☐
staĝanto ☐ korespondanto ☐

Mi, pere de ĉi tiu peto, kandidatiĝas al la statuso de membro de IJEA obeonte ties statuton kaj pagonte la ĉi-suban kotizon.

Jarkotizo (se ordinara membro de ne-esceptaj landoj) ............ 14 eŭroj
(se ordinara membro de iamaj socialismaj orient-eŭropaj landoj, Azio -escepte Koreio, Japanio kaj Israelo), Afriko kaj Latinameriko.......... 7 eŭroj

Pagmaniero: Eblas ĝiri al UEA-konto **ejax-r**

Subskribo de la kandidato

Decido pri la kandidateco
per subskribo de IJEA estrarano

Prezidanto: jurista@esperanto.ac

**Internacia Jurista Esperanto-Asocio**
**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**